



ESPÉRANTO-NORD

Fédération d'espéranto des régions Nord-Pas-de-Calais & Picardie

PROTOKOLO DE KUNSIDO DE LA FEDERACIA KOMITATO

Dato: 24an de Novembro 2012

Loko: Office Culturel, 61 Grand-Place, 62000 Arras

Tagordo:

- 1- Bilanco Stella 2012
- 2- Preparo Stella 2013
- 3- Kongreso de la Norda Federacio 2013
- 4- Norda Gazeto
- 5- Informoj el la lasta komitat-kunveno de Espéranto-France
- 6- La nova Tinĉjo
- 7- Kie konservi la librojn kaj revuojn?
- 8- La filmo pri Esperanto
- 9- Diversaĵoj

Kunvokitoj :

	Ĉeestis	Senkulpiĝis	Ne ĉeestis
Arlette Plutniak, prezidanto (Ar)	X		
France Valet, vicprezidanto (Lil)	X		
Katja Boen, sekretario (Lil)	X		
Xavier Vilain, kasisto (Dun)	X		
Edmond Plutniak (Ar)	X		
Claude Longue-Épée (Lil)	X		
Xavier Dewidehem (Lil)	X		
Michel Dechy (Lil)	X		
Richard Valet (Lil)	X		
Jean Dietrich (Val)	X		
Jacky Ramon (Ar)	X		
Cyrille Decouture (Pik)	X		
Catherine Lévêque (Pik)	X		
Joëlle Muller (Ar) <i>rajtigis Edmond Plutniak</i>		X	
Thérèse Dequidt (Lil) <i>rajtigis Katja Boen</i>		X	

15 komitatanoj ĉeestas (13) aŭ estas reprezentataj (2): la kvorumo estas atingita.

1. Bilanco Stella 2012

Ĉiuj partoprenantoj tre kontentis pri la staĝo kiu bonege disvolviĝis.

Catherine Lévêque atentigas nin pri financaj demandoj. Ni devus informiĝi ĉu estas io oficiala farenda pri la monsumo pagita al Jacques Yvart (ĉu devus esti atestilo pri pago?) Ŝi insistas por ke ni havu pravigilan dokumenton kiam temas pri sufiĉe gravaj monsumoj elspezitaj de la federacio.

2. Preparo Stella 2013

Venontan jaron estos la 25a nordfrancia renkontiĝo, ĝi estos do jubilea renkontiĝo.

Ĉiuj el ni ricevis leteron de Arlette Plutniak pri starigo de korusa ateliero por festi tiun jubileon. Jam favore respondis 15 homoj kiuj intencas partopreni tiun atelieron. Franjo Lévêque jam anoncis ke ŝi povos gvidi la grupon.

Ni verŝajne proponos 4 diversajn atelierojn:

- ateliero por komencantoj (gvidata de Katalin Kovats aŭ eble de Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge)
- ateliero por koruso kun Franjo Levêque
- ateliero pri Tinĉjo kun Michel Dechy. Ĝia nomo povus esti *Paroliga rondo kun Tinĉjo kaj Michel*.
- Literaturo kun Anne Jausions

Ŝajnas esti pli bone ne indiki nivelojn (krom kompreneble la nivelo de la komencantoj). Gravus ke estu kaj paroliga grupo kaj alia grupo por homoj kiuj preferas nur aŭskulti.

Ĉar estos jubilea renkontiĝo ni povus festi George Lagrange kiu iniciatis tiujn renkontiĝojn, kaj France kaj Richard Valet kiuj organizis ilin dum multaj jaroj. Bona ideo estus inviti Pascal kaj Marie-Rose Vilain kiuj konatiĝis en Morbecque, sed ili estis kontaktitaj kaj diris ke ili dezirus partopreni en 2014. Claude Longue-Épée pretas paroli pri la kabaredo de la tri koboldoj (Georges Lagrange regule vizitis ĝin).

Pri elekto de dato, Arlette Plutniak opinias ke la 16 kaj 17aj de Novembro plej taŭgas ĉar poste la centro de Stella-Maris fermiĝas, ni estus la ununura grupo en la staĝejo kaj tio faciligas la organizadon.

Sabate vespere estas antaŭvidita koncerto de Gijom Armide, juna kantisto kiu jam venis al Stella. Dimanĉe, la korusa ateliero povus prezenti sian spektaklon.

3. Kongreso de la Norda Federacio 2013

Xavier Dewidehem proponas al ni organizi la kongreson en Halluin kies urbestro estas la prezidanto de Xavier D. kaj favore rilatas al Esperanto. La *Salle du manège* tute taŭgas. Ĝi havas scenejon, kaj estas libera la 14an de Aprilo.

Dum nia kongreso okazos kiel kutime nia jarkunveno, tagmanĝo, kaj distra parto. Xavier Dewidehem proponas inviti Gijom Armide. La kosto estus 300€ ekskluzive de kostoj ligitaj al piano (kunportita aŭ ne de Gijom Armide) kaj de la loĝado (prefere ĉe privatulo). Ni povus malfermi tiun spektaklon al la ekstera publiko. Xavier Dewidehem emfazas la gravecon en Halluin de translimeco kun Belgio kaj proponas inviti niajn belgajn amikojn.

Michel Dechy rememorigas ke la salono Masquelier en Villeneuve d'Ascq estas libera la 24an de Marto. Edmond Plutniak diras ke ĝis nun la kongreson organizis unu klubo ĉiufoje, konservante la profiton (la malprofiton sponĝis la federacio...). Edmond Plutniak aprobas la du projektojn, LVE elekto.

4. Norda Gazeto

Cyrille Decouture klarigas ke li atendas ĝis kiam li havas ĉiujn tekstojn por vicigi ilin. Edmond Plutniak gratulas dirante ke temas pri la plej bela E-o-revuo en Francio. Rimarkindas ke la legantoj maljuniĝas kaj ilia vidkapablo malpliboniĝas. Eble la litertipo povus esti pli legebla. Claude Longue-Épée tamen diras ke malgraŭ siaj vidproblemoj, li sukcesas facile legi ĝin. Ekestas diskuto pri la diversaj manieroj pligrandigi la litertipojn sen ke la kosto estu tro granda. Eble la sama tarifoj permesus aldonon de plia folio. Tio estas kontrolenda. Alvenis demandoj pri sendo de la revuo kiel PDF. Estas malfacile sendi ĝin kiel senkosta PDF ĉar tiam ne plu estus kialo pagi ĝin. Al tiuj kiuj pagas kotizon, oni povus senprobleme sendi ĝin kiel PDF.

5. Informoj el la lasta komitat-kunveno de Espéranto-France

Espéranto-France petas ke ĉiuj kiuj sukcesis ĉe la C1-ekzameno kaj la ekzamenoj de FEI kaj instruas/is kadre de la franca edusistemo sin konatigu tiel ke Espéranto-France havu liston de estontaj ekzamenantoj por prezenti al la francaj ministroj.

6. La nova Tinĉjo

La nova Tinĉjo, *La templo de la suno*, baldaŭ aperos. 3000 ekzempleroj estos eldonita kaj Espéranto-France zorgos pri la financa flanko. La albumo estos mendebla ĉe Espéranto-France.

7. Kie konservi la librojn kaj revuojn?

La sama problemo konstateblas ĉe ĉiuj niaj kluboj. Dunkirko disponas pri granda stoko da revuoj, la libroj de LVE (krom tiuj kiuj estas en la urba biblioteko de Villeneuve d'Ascq) estas ĉe familiano de Michel Dechy, kaj ĉe Arlette kaj Edmond estas ankaŭ grandegaj kolektoj da revuoj. Sendi ilin al Afriko povus esti solvo sed la sendokostoj estas ege altaj kaj krome se oni stokas ilin tie en maltaŭga loko, malsekeco damaĝos ilin. Edmond Plutniak ŝatus ke la revuoj de Araso restu en Araso, tiuj de Lille en Lille... Li proponas disdoni al aliaj esperantistoj po unu kolekto, sed verŝajne la plimulto el ili jam havas proprajn kolektojn. Michel Dechy klarigas ke la sama problemo okazas en Bouresse. Arlette Plutniak intencas skribi pri tio al la kortrejka klubo kaj al la Esperanto-muzeo de Gray-sur Saône. Catherine Lévêque klarigas ke tiuj dokumentoj povus esti ciferitaj, kaj tiam ne plu necesus konservi ilin paperforme. Temus tamen pri grandega laboro.

8. La filmo pri Esperanto

La filmo eldonita de SAT estos dublita en 22 lingvoj. Ĝi jam pretas en Esperanto kaj en la franca.

Lille 2015

La 16an de Julio delegacio de UEA gvidata de Osmo Buller vizitis Lille kaj de tiam ne venis respondo. Baldaŭ okazos kongreso en Barcelono pri organizado de kongresoj. Necesas precizigi la aferon por ke UEA decidu dum sia aprila estrarkunsido.

Diversaĵoj

Malfermiĝis en Lille nova gastejo kun esperanta nomo: *Gastama*.

En la revuo de MGEN aperis artikolo pri Jean Prouvost en kiu li parolas pri siaj gepatroj kiuj estis esperantisto.

Kunredaktita de Katja BOEN kaj Arlette PLUTNIAK